Regularo
pri la Komisiono pri eksteraj rilatoj (KER) de REU

Akceptita de la 30-a Konferenco de REU, setlejo Carina Lago (Tiĥvina distrikto), 17.07.2019.

1. La Komisiono pri eksteraj rilatoj (KER) de REU estas kreita laŭ decido de la 28-a Konferenco de REU en 2015.
2. Celoj de la agado de KER estas:
   kunordigi kaj aktivigi agadon de la rusia esperantista movado rilate al neesperantistaj movadoj, sociaj organizaĵoj, politikaj partioj, ŝtataj instancoj kaj institucioj, universitatoj, akademioj, lernejoj kaj tiel plu.
3. Taskoj de la agado de KER estas:
   a) popularigo de Esperanto kaj ĝiaj idealoj en konkretaj neesperantistaj organizaĵoj;
   b) trovo de vojoj por kunlaboro en komunaj sociutilaj projektoj;
   c) plialtigo de la prestiĝo de REU kiel socia organizaĵo;
   ĉ) esploro de ebloj por financaj kaj aliaj rimedoj por REU;
   d) pli vasta manifestado en Rusio pri utilo de Esperanto por la socio ĝenerale.
4. Manieroj de la agado de KER estas:
   a) kontaktado kun diversaj organizaĵoj kaj dialogado kun ili;
   b) partopreno en diversaj projektoj, programoj, aranĝoj, eventoj;
   c) interesigo de organizaĵoj pri siaj projektoj konformaj al celoj de la organizaĵoj kaj tiel plu;
   ĉ) kunlaboro kun similaj komisionoj aŭ grupoj en aliaj Landaj Asocioj de UEA.
5. La Komisiono agadas laŭ la Statuto de REU kaj leĝoj de Rusia Federacio.
6. Laboron de la Komisiono kunordigas estrarano de REU, kiu mem estas membro la Komisiono.
7. Listo de membroj de la Komisiono estas prezentata de la Estraro kaj akceptata de la Konferenco de REU. Membro de la Komisiono devas esti aktuala membro de REU (individua, aligita aŭ asociita), aŭ aligita laŭ la kategorio —amiko de REU.
8. Inter Konferencoj la Estraro de REU rajtas ŝanĝi la membrokonsiston de la Komisiono kun posta aprobo de la Konferenco.